

ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2014/1 vintro/printempo 2014

Mailed under Canada Post Publications Mail
Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*.



Partoprenantoj je la komuna kongreso de KEA kaj Esperanto-USA, Sidnejo, Brita Kolumbio, 11-14 julio 2014, antaŭ la kongresejo, la Mary Winspear Centre.

Enhavo de la Numero

Aferoj pri Kanado kaj KEA

Kolumnoj de la redaktoro	3
Novaĵoj pri KEA	4
MEKARO 2014: Impresoj, Trefleo Mercier	5
Petoj/anoncoj el eksterlande	7
Novaĵo pri kalendaroj	8
Financa raporto de KEA por 2013, Yves Bellefeuille	9
Komuna Kongreso, julio 2014, raporto, Geoffrey Greatrex	10
Diversaj landaj novaĵoj	11

Artikoloj, Kontribuaĵoj kaj Distraĵoj

Festo de la 90-jariĝo de Marjorie Boulton, Geoffrey Greatrex	12
Lingvo mirinde riĉa kaj abunda, Steĉjo Norvell	14
Ukrainio en Japanio, Ĵenja (Yevgeniya) Amis	15
En Kliniĝanta Velboato Ili Seksumis, Wally du Temple	20
Krucvortenigmo, D. Reble	21
Kolorfotoj pri MEKARO	23

Limdato por la sekva numero : 15a de decembro 2014

Kolumnoj de la redaktoro

Ĝus mi revenis de nia komuna kongreso en Sidnejo, Brita Kolumbio, kiun ĉeestis proksimume 60 personoj; nur proksimume 15 tamen venis de Kanado. Aliflanke, indas noti ke 63 personoj ĉeestis la someran kursaron (NASK) en apuda Viktorio, kiu estas rimarkinde alta cifero kompare kun la lastaj jaroj. Kvar partoprenantoj ricevis stipendion de KEA por povi partopreni la kursaron. Dum la kongreso la kanadanoj havis la okazon diskuti inter si pri la asocio, kiel ĝi antaŭeniru ktp. Iom post iom aperos anoncoj, sed jam konstateblas la utilo de nia lastatempa dungato, Joel Amis, kiu protokolis kaj starigis gravajn demandojn al la estraranoj. Leviĝas demandoj pri nia revuo. Necesas agnoski, ke nia fratina revuo, *La Riverego*, kiun lerte redaktas kaj kompostas Ĵenja Amis, pli ofte aperas kaj longas ol la nia. Ĝi ekzistas nur en pdf formato, sed malgraŭ tio, oni deponas (virtualan) version de ĝi en gravaj bibliotekoj ktp. Eble iuj inter vi jam ricevas *Lumon* tiufornate, sed certe ne plimulto. Necesos do cerbumi, ĉu oni aperigu ĝin ĉefe elektronike, aŭ (kontraŭ iom pli alta prezo) papere. Oni povus malaltigi aliĝkostojn al KEA per tia ŝanĝo, des pli ĉar poŝto-kostoj lastatempe tre altiĝis. La redaktoro bonvenigas viajn opiniojn pri la afero; li intertempe rekomendas, ke oni konsultu la *Riveregon*, kiun oni trovos ĉi tie: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego> .

Inter NASK kaj la komuna kongreso okazis AMO, t.e. seminario por aktivula maturigo, kiun gvidis pluraj eminentuloj, i.a. Mark Fettes, Grant Goodall, prezidanto de ESF, kaj Orlando Raola, la prezidanto de Esperanto-USA, kaj pluraj fakuloj pri diversaj kampoj, ekz. Chuck Mays kaj Derek Roff. Aktive partoprenis pluraj kanadanoj, ekz. Tamara Koziej, kaj eksterlandanoj, kiel Hiroyuki Usui.

Pro la ĝus-okazinta kongreso mi prokrastis la aperon de la jena numero de *Lumo*. Sed denove mi dankas al Steĉjo Norvell pro lia laboro pri ĝi, spite plurajn malfacilaĵojn. Samtempe necesas danki Wally du Temple pro la tioma laboro rilate la kongreson, la seminarion kaj NASK. Estas impona laboro, jam esti organizinta du kongresojn komunajn: mi ankaŭ ĉeestis la unuan, kiu okazis en la sama kongresejo en Sidney, la centro Mary Winspear, en 2004. La deĵorantoj en la centro, cetere, estis mirinde helpemaj kaj la kondiĉoj plej bonaj.

Solvoj al la krucvortenigmo (pro kiu oni dankas al Don Reble) min atingis antaŭ la fino de novembro. Mia adreso estas 903-333 Chapel street, Ottawa, Ontario, Kanado K1N 8Y8, retroŝte: greatrex@uottawa.ca .

Novaĵoj pri KEA

Unue, necesas pardonpeti, ĉar en la pasinta numero, oni ellasis la nomon de Ken Price en la listo de estraranoj, nia fidela sekretario jam delonge! Due, oni kore danku al Yves Bellefeuille por lia multjara laborado kiel kasisto de KEA: li devis demisii de la estraro antaŭ kelkaj monatoj, kaj transprenis la kasistan postenon Raymond Brisebois. Al li KEA ankaŭ ŝuldas dankon pro tio, ke li subite enposteniĝis. Trie, estas plezuro anonci, ke la estraro alektis novan estraronon, Tamara Koziej, el Saguenay, Kebekio, kiu sendube vigligos la agadon de nia asocio. (Foton de ŝi vi trovos en la artikolo pri MEKARO). Ni kore bonvenigas ŝin.

Stipendioj

Dank' al malavara donaco de Yves Bellefeuille, ĝis lastatempe la kasisto de KEA, nia asocio povas proponi stipendion al junulo, kiu intencas unuafoje ĉeesti UK-on aŭ IJK-on en 2015. La ricevonto estu homo loĝanta en Kanado, en TEJO-aĝo en 2015 (t.e., naskiĝinta la 1an de januaro 1985 aŭ poste), kiu uzos la subvencion por iri unuan fojon al UK, aŭ por iri unuan fojon al IJK, en 2015. Do, oni povas uzi la subvencion por iri unuan fojon al IJK eĉ se oni jam iris al UK, aŭ inverse. Juĝos la gajnanton la instrua komisiono de KEA. La limdato por alsendi sinproponon estas la 31a de oktobro 2014; oni sendu ĝin al Geoffrey Greatrex, greatrex@uottawa.ca (en Esperanto). Oni klarigu la peton en bona Esperanto kaj priskribu sian jaman sperton en Esperantujo (ekz. kursoj kaj kunvenoj, sed evidente eblas kandidatiĝi, se (ekzemple) oni lernis nur perrete). Cetere notindas, ke KEA intencas daŭrigi tion, kion oni faris ĉi-jare, t.e. disdoni stipendiojn al KEA-anoj, kiuj partoprenas NASK-on; ĝi okazos probable en Detrojto en 2015.

Se vi deziras apogi ĉi tiun agadon, t.e. lernadon de E-o inter niaj samlandanoj, vi povos sendi donacon al nia kasisto, Raymond Brisebois, kaj indiki, ke temas pri donaco al nia eduka fonduso. Lian adreson vi trovos en via membrolisto, kiun oni antaŭnelonge presis kaj disdonis. Bv. sciigi la redaktoron, se la listo ne atingis vin.

Aliaj anoncoj/raportoj

Kvar anoj de la estraro de KEA diskutis aferojn en Sidnejo: Wally du Temple, Ken Price, Paul Hopkins, Geoffrey Greatrex. Ankaŭ partoprenis la diskutojn Joel Amis, kiu laboras partempe por KEA (kaj loĝas en Montrealo) kaj lia edzino, Ĵenja Amis. Ken Price proponis, ke oni pripensu reverkadon/modernigon de nia statuto; je publika kunveno, li disdonis malnetan version de modifita statuto; li poste cirkuligos version de sia propono en Word kaj pdf formatoj. Necesos pli da konsultado antaŭ ol findecidi. Leviĝis ankaŭ la estonto de *Lumo*, ĉu oni aperigu ĝin en pdf formato, ĉu oni kunlaboru pli kun *La Riverego* ktp. Nenion oni findecidis, sed oni diskutos la aferon pli profunde: eblas eble malaltigi aliĝkostojn al KEA, se oni ne plu devas presi kaj elsendi nian bultenon. Tamen, oni substreku, ke neniu, kiu volas daŭre aboni la revuon papere, ne povos tion fari - do ne maltrankviliĝu, se vi ne estas

retumanto! En la longa daŭro, ni emus enketi inter nia membraro pri ĝiaj atendoj kaj perspektivoj; denove, necesas ke la ideo maturiĝu intertempe. Oni deziras modernigi la retejon; eble ekzistas jam taŭgaj homoj, kiuj povos tion fari. La estraro konsultos la koncernulojn.

MEKARO 2014: Impresoj

Trefflé (Trefleo) Mercier

En 2014 Mezkanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO) okazis por la unua fojo en la urbo Sherbrooke (Ŝerbruko), Kebekio. La ĉiujara evento allogis 39 partoprenantojn el Kebekio, Ontario kaj Usono. Kelkaj pli anonciĝis, sed bedaŭrinde devis nuligi sian ĉeeston pro malsano aŭ pasporto-problemoj. La aktiveco tamen arigis plej varian grupon el diversaj etnoj kaj lingvoj.

Ekde la alveno sabaton matene en la salono rezervita por la mekaranoj, ĉiu partoprenanto ricevis teknon enhavantan propran nomŝildon, kiu montras la nomon kaj devenon kaj 18-paĝan dokumentaron. Ĉiuj fotoj de la diversaj dokumentoj estis presitaj kolore. Oni jam povis esplori la programon kaj ekskursajn notojn de la tritaga aranĝo.

Surprizis min, ke persono kiel Eliza Lisovskaya (Otavo), el rusa deveno, studis Esperanton nur kelkajn semajnojn antaŭ ol partopreni MEKAROn. Ŝi eĉ ne konis samideanon en Otavo kaj neniam estis partopreninta lokan kunvenon. Eliza estis tre kontenta konatiĝi kun Yves Bellefeuille. Alia persono kiu esperantistiĝis antaŭnelonge estas André Couture el Kebeko. Li studis la lingvon ĉe Lernu.net kaj parolis por la unua fojo en Esperanto dum nia renkonto! Tio pruvas ke Lernu.net efike plenumas sian rolon kaj meritas esti apogata.

Estis aliaj “freŝbakitaj” esperantistoj kaj sufiĉe multe da gejunuloj por pruvi ke anstataŭantoj fakte ekzistas en nia komunumo spite la ŝajnon. Mi estis aparte impresita de la usonaj partoprenintoj kiel Larry Kenny, Christopher Zervic kaj Margo Cohen, kiuj bonege regas la lingvon kaj konversacias plej facile. Mi ofte aŭdas ke la anglalingvanoj malfacile regas (aŭ deziras regi) fremdajn lingvojn, sed tio evidente ne estas veraĵo, almenaŭ rilate Esperanton.

Estis agrable revidi la kutimajn partoprenantojn de MEKARO kiel la parojn Fleury kaj Amis, Jeremion kaj Jogon, Detlef, Mateon, Franciskon kaj Minjon, Jed, Jacob, la du Suzanojn, Tiffany kaj Ryan, Karlon kaj Den, kaj aliajn. La plej granda samnoma delegacio venis el Saint-Honoré-de-Chicoutimi (Saguenay-regiono en Kebekio): kvar Koziej el la sama familio — Tamara (poldevena), Jozefo, Kamila kaj Taŝila. Se John Taylor (Dunnville, Ontario) povintus veni kun siaj du gefiloj, estintus la dua plej granda samnoma familio. Menciindas ankaŭ Suzanne (Suzano) Bolduc (Côte-Saint-Luc, Kebekio) kiu venis kun du el siaj tri filoj. Min multe impresis ankaŭ Ruth (Margo) Cohen, kiu prenis aviadilon en Vaŝingtono, flugis ĝis Manchester, New Hampshire, poste luprenis veturilon por veturi ĝis Ŝerbruko! Nekredebla strebado nur por mallonga evento. Tio montras ke kelkaj samideanoj pretas elspezi multe da mono, energio kaj

tempo por renkonti amikojn. Gratulon al vi, Margo!

Inter ni ankaŭ estis unu neesperantisto, kiu fidele partoprenis preskaŭ ĉiujn programerojn. Guillaume Tubœuf, amiko de Laetitia Bert (ambaŭ francdevenaj), ekloĝintaj en Montrealo, decidis akompani ŝin al Ŝerbruko. Estus interese havi liajn impresojn pri tiu kunveniĝo de strangparolantoj (eksterteranoj?). Mi pretas veti ke li trovis nin plej simpatia grupo kiu scias amuziĝi sen lingvobarilo.

Kion pensi pri la kunvenejo mem? Kiam oni scias ke dum tiu sama semajnfino kunvenis kelkdek mil partoprenantoj de muzikfestivalo en la sama urbo, oni povas nur miri ke la organizantoj de MEKARO 2014 sukcesis trovi lokon tiel konvenan kiel la Universitaton Bishop's. Eĉ se ĝi situas iom malproksime de la vera urbomezo de Ŝerbruko, ĝi ofertis ĉiujn necesajn servojn por tia evento. Ĉiuj konsentis ke la ĉambroj estis belaj, grandaj, komfortaj kaj puraj. Oni facile povas kompari kun la universitataj ĉambroj de aliaj Mekaroj por konstati ke Ŝerbruko estis escepto rilate al la ĉambroj kaj kafejo. La universitato eĉ povis disponigi specialan ejon por la antaŭekskursaj kunvenoj kaj distraj vesperoj. La prezo de la kunvenejo estis tiom favora ke la ĉijara kotizo estis nur \$10.

Kiam temas pri turisma kunveno la vetero havas gravan rolon kaj la lokaj organizintoj havis tiun zorgon en la menso ekde la komenco de la ellaborado. Ĉu sunos, ĉu pluvos? Kion fari speciale en kazo de pluvo? Ni estis sufiĉe bonŝancaj ĉijare se oni konsideras ke niaj printempoj estas ĝenerale tre pluvaj. Sunis sufiĉe por permesi la plej gravajn ekskursojn, nome ĉirkaŭ la Lago de Nacioj, la Gorĝon de la rivero Magogo kaj la dimanĉan programon. Multaj alte aprezis la prezentaĵon de la posedanto de la sapon-fabrika, kiu per plej humura stilo klarigis kiel oni fabrikas sapon tie per olivoleo. Post la prezentaĵo multaj mekaranoj aĉetis varojn de tiu entrepreno.

Eble la plej grava "difekto" de tiu semajnfina programo estis la vespermanĝo de la unua vespero en la vjetnama restoracio, kie la manĝaĵo estis bongusta sed la servo ege malrapida. Estis nur unu kelnerino por servi la tutan grupon krom aliaj gastoj sur la sama etaĝo. La lokaj organizintoj bedaŭras tion kaj esperas, ke la aliaj aktivecoj kompensis tiun malglataĵon. Ja estus interese havi aliajn komentojn por helpi plibonigi la sekvajn MEKAROjn.

Finfine oni povas konkludi ke la Ŝerbruka MEKARO estis bela sukceso se oni konsideras ke por la lokaj organizintoj estis la unua sperto. La ircelo estis iom malproksima por multaj partoprenantoj, kiuj al kutimiĝis al renkontoj en pli gravaj urboj. Sed preni freŝan aeron de tempo al tempo revigligas la cerbon, ĉu ne?

Kolorfotografioj pri MEKARO troviĝas en la lastaj paĝoj de tiu ĉi numero de *Lumo*.

Petoj/anoncoj el eksterlande

Atingis la redaktoro la jena retmesaĝo de Nepalo. Ĉar mi ne povos iri por instrui en Nepalo, mi publikigas ĝin ĉi tie esperante, ke iu alia kanadano interesiĝos pri la peto.

Tre kara kaj estimata D-ro. Geoffrey Greatrex, Elkorajn salutojn.

Antaŭ ĉio mi volas elkore danki vin pro via reago respondante mian retleteron, kiun mi skribis dum majo 2014, kaj kiu estis nia invito al vi pri volontula instruado de Esperanto en niaj ligitaj lernejoj en Kathamnduo kaj ankaŭ en aliaj belaj urboj de Nepalo. En Kathmanduo, du grupoj entute 120 da niaj gelernantoj kiuj lernis almenaŭ bazan nivelon de Esperanto ŝatas amikiĝi internacie:

<https://drive.google.com/file/d/0B5jwpZFihYUXelRjWmxoTzZlc3c/edit?usp=sharing> kaj

<https://drive.google.com/file/d/0B5jwpZFihYUXMktkZVFOOEx5dEU/edit?usp=sharing>

Ĉu vi bonvole povos amikiĝi geknabojn de via lando al Nepalaj ĉarmaj geknaboj? Ĉu vi aŭ iu el viaj bonkoraj geamikoj jam decidis vojaĝi al Nepalo kaj volontule instrui, lertigi niajn lernantojn flue konversacii en Esperanto? Se jes, bonvolu informi al mi tiel frue kiel eblas, pri la monatoj en kiuj estos oportune por vi vojaĝi al Nepalo, do ni planu kaj aranĝu por vi senpagan tute oportunan loĝadon. Bonvolu skribi al mi se vi havos iajn ajn demandojn. Bonvolu akcepti miajn elkorajn bondezirojn por vi, viaj familianoj kaj geamikoj.

Amike via

Mian Salam SHANY

m.s.shany@gmail.com kaj vidu la retejon: <http://www.southwestern.edu.np/>

Novajoj pri Vinilkosmo (Francio)

De 10 jaroj Cyrille Hurstel varbas pri Esperanto kaj havas rezultojn ne kredeblajn. Lastan someron, li sukcesis meti Esperanton en televidon en Usono, Francio kaj Italio. Artikoloj estis videblaj en pli ol 20 landoj.

Mi invitas vin spekti tiun mallongan videon, kiu ebligas al vi renkonti lin. Li anoncis, ke li baldaŭ malkaŝos siajn metodojn por havi tiom imponajn rezultojn. Vi vidos kiel li konektiĝas kun homoj, por ke ili sekvu lin. Kiel Cyrille Hurstel informas 1 000 000 da personoj jare sen labori??

Por tio spektu lian videon ĉi tie: http://brila-aktivulo.com?ap_id=vinilkosmo

Baldaŭ alvenos novaĵoj pri la rekonstruata elŝutejo Vinilosmo-mp3, kaj ankaŭ novaĵoj pri novaj ellaboritaj projektoj aperontaj kadre de la Promeskapanjo (Kapriol'!, Ĵak Le Puil, JoMo, Amindaj...). Nia kompleta katalogo ĉe: <http://www.vinilkosmo.com>

Novajoj pri kalendaro

Kalendaro kun laŭtema bildvortaro por lernantoj de Esperanto:

http://s3-eu-west-1.amazonaws.com/lingolia/calendar/2014/lingolia_2014_eo.pdf

Novajoj pri la ligo inter la filmo *Gravity* kaj Esperanto (senditaj de Gene Keyes)

La filmo *Gravity* kun Sandra Bullock kaj George Clooney gajnis iujn Oskar-premiojn, do samideanoj devus koni ĝian rilateton kun Esperanto. Kial? La reĝisoro, verkanto, produktisto estas Alfonso Cuarón, elstara meksikia filmisto, kies kompanio nomiĝas ‘Esperanto Filmoj’. Li mem ne estas Esperantisto, sed li subtenas la ideon. Sam Green, la reĝisoro de *The Universal Language* intervjuis lin ĉi tie:

<http://esperantodocumentary.com/blog/an-interview-with-director-alfonso-cuaron>

Vidu ankaŭ:

Esperanto Filmoj: https://en.wikipedia.org/wiki/Esperanto_Films

Esperanto Filmoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto_Filmoj

Alfonso Cuarón: https://en.wikipedia.org/wiki/Alfonso_Cuar%C3%B3n

Alfonso Cuarón: https://eo.wikipedia.org/wiki/Alfonso_Cuar%C3%B3n

Gravity (filmo): [https://en.wikipedia.org/wiki/Gravity_\(film\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Gravity_(film))

Esperanto en universitata ĵurnalo en Montrealo (informas Paul Hopkins)

Ĉi tiu artikolo pri Esperanto aperis hieraŭ (21a de januaro) en *The Link*, la studenta gazeto de Universitato Concordia.

<http://thelinknewspaper.ca/article/5322#.Ut6A1MtDyT4.facebook>

Novajo pri laste aperinta traduko de anglalingva romano de membro nia

Detlef Karthaus informas nin, ke ĵus aperis lia traduko de romano alskribita kutime al Oscar Wilde, *Telenio*: ĝi aperis anonime en eldono de nur 200 ekzempleroj en Londono en 1893 sub la titolo *Teleny, or The Reverse of the Medal*. En 1895 sekvis dua, ankaŭ anonima eldono. Tiutempe anglaj romanoj kutime havis du titolojn. La romano estas atribuita al Oscar Wilde (1854-1900), sed ties autoreco ne estas tute certa. La romano rakontas pri la samseksama rilato inter la franca dano Kamilo Des Grieux kaj la hungara pianisto Reneo Telenio, kies amo estas rompita pro sociaj premoj.

Financa Raporto 2013

Post ses-jara deĵoro, mi transdonas la kasistan postenon al Raymond Brisebois. Dum mia deĵoro, la kapitalo de KEA multe kreskis:

2008: 22710	2010: 32370	2012: 42556
2009: 25602	2011: 37487	2013: 40881

Kompreneble, principe estas bone ke KEA riĉiĝis. Tamen, ni ne ricevas monon por fiere meti ĝin en la bankon, sed por progresigi esperanton kaj nian asocion. Mia espero estas, ke la nova estraro ne hezitos utile elspezi nian monon.

Bilanco komence de 2013:

Aktivo:

Banko 17214,95
 Konto ĉe UEA -133,97 (EUR -104,26)
 Konto ĉe FEL -121,37 (EUR -94,47)
 Kontoj de la libroservo 10320,05
 Libraro Ludovika 7340,00
 Fondaĵo ĉe Victoria Foundation 40360,42
 (noto 1)
 Librostoko 8909,80
 Antaŭpagitaj elspezoj (poŝto) 175,11
 Sume 84064,99

Pasivo:

Kapitalo 42555,89
 Rezervo dumvivaj membroj 36200,00
 Rezervo prizorgo libraro 4754,10
 Instrua fondaĵo 555,00
 Sume 84064,99

Spezoj:

Enspezoj:

Kotizoj 1055,00
 Donacoj 1684,00
 Rentumo/Investaĵoj 7352,40 (noto 1)
 Perado de revuoj 91,82
 De rezervoj 1200,00
 Kurzo-diferencoj 73,11
 Sume 11456,33

Elspezoj:

Lumo 2219,66
 Pago al UEA 121,60
 Estraraj kostoj 166,91
 Libroservo 1740,10 (noto 2)
 Deskribo librostoko 8505,70 (noto 2)
 Subvencio 300,00
 Aliaj elspezoj 76,97
 Sume 13130,94

Perdo 1674,61

Bilanco fine de 2013:

Aktivo:

Banko 24394,61
 Kontoj ĉe UEA 1333,27 (EUR 974,54)
 Konto ĉe FEL 0,00
 Libraro Ludovika 7340,00
 Fondaĵo ĉe Victoria Foundation 46365,82
 (noto 1)
 Librostoko 404,20
 Ĉeko enkasigota 1347,00
 Antaŭpagitaj elspezoj (poŝto) 5,48
 Sume 81190,38

Pasivo:

Kapitalo 42555,89
 Rezervo dumvivaj membroj 35000,00
 Rezervo prizorgo libraro 4754,10
 Instrua fondaĵo 555,00
 Perdo -1674,61
 Sume 81190,38

Noto 1: En 2006, KEA starigis fondaĵon ĉe Victoria Foundation. Victoria Foundation tenas la kapitalon de tiu fondaĵo por KEA kaj investas ĝin; KEA rajtas ricevi la profiton, sed ne la kapitalon. Dum la jaro 2013, la rezulto de la fondaĵo estis +18,2%, aŭ gajno de \$ 7352,40.

Noto 2: Pro emeritiĝo de la plur-jara respondeculo, Normand Fleury, la libroservo ĉesis funkcii en 2013. La tuta stoko estis rabatita je 50%; la stoko kiu poste restis (krom **La eta princo**) estis deskribita al simbola valoro de unu dolaro.

Komuna kongreso de KEA kaj Esperanto-USA Sidney, Brita Kolumbio, 11-14 julio 2014

Geoffrey Greatrex

Antaŭ raportoj pri la kongreso, necesas noti komence ke jam pli frue en la semajno komenciĝis aranĝoj en la centro Mary Winspear, kie poste okazis la kongreso. En merkredo kaj ĵaŭdo kunvenis proks. 20-25 aktivuloj, kie ili diskutis pri strategioj taŭgaj en Norda Ameriko: temis pri la dua tiel nomata 'AMO-seminario', t.e. por la maturigo de aktivuloj, unu flanko de la strategia plano de UEA. Pri la seminarioj oni povas legi en la reto kaj en la revuo *Esperanto*; oni esperas okazigi duan tian seminarion en Norda Ameriko en la venonta jaro. Aliaj okazos iom ĉie dum la venontaj monatoj. En la vendredo kunsidis la estraro de Esperanto-USA; ankaŭ tiu de la Esperantic Studies Foundation (ESF). Vespere ekis la oficiala kongresa programo. Supozeble oni devintus sin renkonti en iu trinkejo, sed Lusi Harmon gvidis partoprenantojn anstataŭe al la apuda hotelo Travelodge, kie troviĝis agrabla senbrua ĝardeno, kie oni babilis ĝis oni forĵetis nin (jam je la 9a vespere!). Ne-esperantistoj tie ŝajne tiom ĝuis la bizarlingvan diskutadon ke ili provizis ilin per kolbasoj.



Post solena malfermo la sekvan tagon (FOTO), je kiu parolis ne nur la prezidantoj de la landaj asocioj, Orlando Raola kaj Paul Hopkins, sed ankaŭ tiu de UEA, Mark Fettes, kaj la motoro de la kongreso, Wally du Temple, proponiĝis riĉa programo. Necesis malfacila elekto inter interesaj prelegoj; mi mem multon lernis de tiu de Paul Hopkins pri la ĉinuka lingvo (aŭ ĵargono). En la posttagmezo okazis sin-prezento de ESF, poste estrarkunsido de KEA. En la vespero loka muzika triopo distris la partoprenantojn - kaj la ĝeneralan publikon - per diversfontaj melodioj. En la mezo de la programo oni montris la duonhoran filmon de Sam Green, *The Universal Language*, tiel informante la ne-esperantistojn pri nia lingvo.

Denove en la dimanĉo abundis prelegoj. Mi multon lernis pri interreta komunikado de prezentaĵo de Chuck Mays kaj Derek Roff, sed pro tio bedaŭrinde maltrafis alian prelegon de Paul Hopkins. Poste mi aŭdis interesan prelegon de Orlando Raola pri la temo de la kongreso, pri la UNESKO-rezolucio de 1954, rimarkinda venko de la tiutempa movado. Fine de la tago okazis bela bankedo, kiun oni servis en la kongresejo mem per bufedo. Dum ĝi oni vendis plurajn interesajn brokantajn librojn aŭkcie; poste pli da distraĵoj - kantoj, dancoj, k.s. Daŭris la programo eĉ en la lundon, kiam okazis alia kunveno de KEA kaj prelego de Ĵenja Amis antaŭ fermo je la fino de la matino.

Resume, bela kaj memorinda okazaĵo. Mi asertus, ke ĉi tiu komuna kongreso pli sukcesis ol la antaŭa en Sidney, eĉ se ĉeestis eble malpli da homoj: ĉi-foje troviĝis proks. 60 nomoj en la kongresa libro, sed aliaj partoprenis, do ŝajnis al mi, ke probable la vera cifero pli proksimis al 75 (vidu la foton). La kongresejo estis ideala loko, parte pro la bele aranĝitaj ĉambroj, parte pro la helpemo de la deĵorantoj; unu eĉ venis por ludi gitaron por ni dum la distra vespero! La vetero belis, kio ne malhelpas, kaj abundas bonaj restoracioj en la ĉirkaŭaĵo. Ni esperu, ke oni povos komune kongresi denove en 2015, sed ĉi-foje en Usono, apud la landlimo, en Detrojto.

Naciaj novaĵoj

Gratulojn al Suzanne Roy pro ŝia agado en Tri Riveroj/Trois Rivières, kie ŝi aperigis artikolon en la loka ĵurnalo, *L'Echo de Trois-Rivières* je la 2a de julio ĉi-jare pri sia vizito al Kartvelio. Oni povas daŭre trovi la longan kaj favoran artikolon je:

<http://www.lechodetroisrivieres.ca/2014/05/07/voyager-grace-a-lesperanto>

En la studenta revuo de la universitato Concordia aperis artikolo pri Esperanto, en kiu oni citas Zdravka Metz. Ĝin oni trovos je:

<http://thelinknewspaper.ca/article/5322#.Ut6A1MtDyT4.facebook>

Festo de la 90-jariĝo de Marjorie Boulton, Oksfordo, 22an de majo 2014

Geoffrey Greatrex

Mi enmetas la mallongan raporton pri ĉi tiu evento en nian revuon, ĉar ja ekzistas kanada dimensio de la afero. Unuflanke, mi mem kunorganizis ĝin, kun la helpo de la kolegio; aliflanke, nia diligenta kunlaboranto, Steĉjo Norvell, ankaŭ partoprenis per videa mesaĝo spektita je la festo.



Kvar prezidantoj de la Esperanto-Asocio de Britio.

Je la 22a de majo okazis en Somerville kolegio, Oksfordo, festeto omaĝe al Marjorie Boulton, ne nur grava verkistino, sed ankaŭ eks-studentino de la kolegio. Ĉeestis ĉirkaŭ 20 personoj, ĉefe esperantistoj, kiuj venis de Britio - i.a. Paul Gubbins, la prezidanto de EAB, John Wells, Edmund Grimley Evans - kaj de pli fore - Brian Moon, Claude Nourmont, Anna Löwenstein. Pluraj amikoj povis virtuale ĉeesti, ĉar oni montris surekrane salutmesaĝojn senditajn de kelkaj landoj, i.a. de Humphrey Tonkin, Christer Kiselman kaj Simon Davies. Ne mankis skribaj salutoj, ekz. de la Akademio. Alparolis la ĉeestantaron Paul Gubbins kaj la

kolegiestrino, Alice Prochaska; ankaŭ Marjorie parolis, angle kaj Esperante, pri siaj spertoj en la kolegio kaj en Esperantujo. La kolegio entuziasme apogis la eventon kaj muntis belan ekspozicion de verkoj de Marjorie, inkl. (ne-eldonitan) taglibron pri ŝiaj dummilitaj spertoj kiel studento en la kolegio (en la angla). La tuta programo daŭris proksimume unu horon, post kio oni tagmanĝis kaj babilis en bela etoso. Franĉjo Veuthey de la CO de UEA, kiu ankaŭ partoprenis, afable filmis la aranĝon, do iam disponeblos la filmo. Intertempe oni povas vidi bildojn de la aranĝo ĉi tie:

http://esperanto.org.uk/eab/eab_news/2014-05-22_marjorie_boulton_datreveno.html

Nia amata Marjorie Boulton, verkisto kaj poeto, reganto de kaj faktoj kaj fantazioj, fariĝis naŭdekjarulo en majo de la jaro 2014.



Marjorie Boulton, plej amata poeto en Esperantujo, admiras la kukon kiu honoras ŝian 90an naskiĝtagan datrevenon.



Marjorie Boulton tranĉas la naskiĝtagkukon helpe de Alice Prochaska kaj Geoffrey Greatrex.



Marjorie Boulton regalias la gastojn dum la festo de ŝia 90a naskiĝtaga datreveno.



Eĉ se estas nur trinketo, eteta gusto da alkoholaĵo, tio helpas pliĝojigi kaj plilongigi la vivon.

Lingvo Miriginde Riĉa Kaj Abunda

Steĉjo Norvell

Esperanto estas lingvo kun vortaro riĉa kaj abunda. Kiam mi uzas Esperanton, mi sentas min vortmilionulo: mi estas kvazaŭ sibirito, ĉirkaŭigata per ŝajne senfina, luksa riĉeco de vorteblecoj.

Pripensu kiom da vortoj oni povas krei kaj kompreni devenaj de unusola radiko: **sana**, **sano**, **sane**, **sani**, **malsani**, **malsano**, **malsana**, **malsaneto**, **malsaneta**, **malsanego**, **malsanega**, **malsanaro**, **nesana**, **nemalsana**, **nesanulo**, **saniĝi**, **sanigi**, **sanemulo**, **malsanemulo**, **malsaniĝi**, **sensaniĝi**, **malsanaĵo**, **malsaniga**, **malsanigi**, **resaniĝi**, **resanigi**, **malsanulisto**, **remalsaniĝi**, **remalsanigi**, **neresaniĝebla**, **saniĝilo**, **sanigilo**, **resaniĝilo**, **resanigilo**, **remalsaniĝilo**, **remalsanigilo**, **eksaniĝi**, **eksanigi**, **ekresaniĝi**, **ekresanigi**, **ekremalsaniĝi**, **ekremalsanigi**, **ekresaniĝo**, **ekremalsaniĝo**, **sanigisto**, **resanigisto**, **resanigistino**, **geresanigistoj**, **resanigistaro**, **saniganto**, **resananto**, **sanulo**, **sanulaĵo**, **sanero**, **malsaneraro**, **malsanulo**, **malsaneca**, **sanulino**, **malsanulino**, **sanularo**, **malsanularo**, **sanularo**, **malsanularo**, **gemalsanuloj**, **sanulejo**, **malsanulejo**, **malsanulejaro**, **resaniĝejo**, **resanigejo**, **sanigilo**, **resanigilo**, **malsanigilo**, **resaninda**, **resaniĝebla**, **resanigaĵo**, **malsanigaĵo**, **ekmalsanulo**, **ekmalsanularo**, **eksresanigistino**, **sanigistaro**, **resanigito**, **resaniginto**, **resanigistaro**, **resanigilujo**, **resaniĝenda**, **resanigenda**, **resaniĝendulo**, **resanigendulo**, **malsanulido**, **malsanulidaro**, **gemalsanulidoj**, **malsaniĝinto**, **resaniĝonto**, **resanigoto**, ktp.* Finite? Tute ne! Preskaŭ ĉiu kunmetitaĵo povas alporti al la imago ankoraŭ pliajn kombinaĵojn per afiksoj.

Ĝis nun ni uzis nur unu radikon. Nun ni trempu la piedfingrojn en vastan maron de kombinaĵoj: **naturresanigistino**, **fungomalsanigaĵo**, **provresanigaĵo**, **marmalsano**, **infanresanigisto**, **veturomalsano**, **sanigfrukto**, **sanigrimedo**, **aktualresanigilaro**, **infekto-****malsano**, **pulmoresaniĝo**, **duonmalsana**, **malsanigpupo**, **ŝtonmalsanulejo**, **psikomalsano**, **mensomalsano**, **mensoresanigisto**, **resaniĝhelpanto**, **mortmalsano**, **artikmalsano**, **hepato-****malsano**, **kojломalsano**, **kalkulusmalsano**, **gruzomalsano**, **plensana**, **ĉefresanigistino**, **resanigistarestro**, **resanigillibro**, **resaniĝhelpilo**, **virusomalsano**, **dormomalsano**, **sanstato** – la eblecoj ŝajnas preskaŭ senfinaj.

Se, el stoko da nur du mil ordinaraj radikoj, oni kombine kreus vortojn, ĉiu vorto el du radikoj, la nombro da haveblaj kombinaĵoj (ne ĉiuj utilaj, kompreneble) estus 1 999 000. Tamen, rimarku, ke “domohundo” ne egalas al “hundodomo”; la nombro da eblaj nocioj estas preskaŭ duobla, aŭ 3 998 000. Oni povus ankoraŭ kombini ĉiun duradikan vorton kun unu aŭ pli el la abundaj afiksoj kaj gramatikaĵoj de nia lingvo. Nun fariĝas la nombro da vortoj por esprimi ideojn vere astronomia. Kaj ni eĉ ne inkluzivis la specifajn, alternativajn aŭ teĥnikajn vortojn.

Ekzemploj de la specifaj, alternativaj kaj teĥnikaj vortoj jen: hospitalo, sanitorio,

kadukulejo, frenezulejo, konvaleski, paciento, kuracisto, medicinisto, geflegistaro, medikamento, veneno, instrumento, bronkoskopo, ĥirurgio, ĥirurgiilo, psikiatro, terapio, iktero, ekscizi, gastrotomio, semiluna valveto, rentgentubo, hidrargia pilaro, litiazo (= kalkulus-malsano), morbilo, lezo, lakso, diareo, artrito, artikinflamo, pediatrio, psikologio, pensoaberacio, mensomalforteco, hepatito, ĥolero, pneŭmonio, pneŭmonito, tuberkulozo, ftizo. Plena listo estas longa; ekzistas multaj fakvortaroj.

Iam, kiam mi ne havis ion pli utilan por fari, mi kalkulis, ke ekzistas **pli ol mil** vortoj por “hospitalo”. Konfese, mi inkluzivis multajn diversajn malsanulejojn, klinikojn, kriplulejojn, kadukulejojn ktp, por multaj specifaj celoj kaj malsanoj por trovi la mil vortojn. Tamen, mi montris, almenaŭ al mi, ke tiom da vortoj ekzistas por institucioj kiuj prizorgas malsanulojn, kriplulojn kaj malfortulojn en nia socio.

Ofte la publiko imagas, ke Esperanto, pro sia relative malgranda nombro da ordinaraj radikoj, devas esti limigita, sed vere, pro la miraklo de kombina matematiko, nia lingvo estas abunda preskaŭ preter la homa imagpovo.

– Steĉjo (ekŝirurgiresanigisto)

* La plejparto el la superaj sanvortoj troviĝas en la 42-a ekzerco de la **Fundamento**, fare de Zamenhof mem. Eble li elektis tiun radikon ĉar li mem estis kuracisto (okulresanigisto).

Tiu ĉi verketo estas modifikaĵo de artikolo kiu aperis en **Inter Ni**, eksa ĉiumonata gazeto de la Halifaksa Rondo, en januaro, 1992.

Ukrainio... en Japanio !

Ĵenja (Yevgeniya) Amis, Ukrainio/Kanado (represita de *La Riverego* 112)



Gion estas inter malmultaj lokoj kie oni nuntempe povas vidi verajn geĝŝojn.

Pli ol trionon de nia tri-semajna vojaĝo ni restis en Kioto, sed mi havas impreson, ke plej ege mankis al ni tempo ĝuste en Kioto, ĉar preskaŭ ĉiutage de tie ni ekskursis al la ĉirkaŭaj urboj. Sed eĉ kun kelkaj monatoj oni ne povas viziti ĉiujn vidindaĵojn de la malnova japana ĉefurbo, kie troviĝas kvinono de ĉiuj Naciaj Trezoroj de Japanio. Mia gvidlibro skribas, ke ĝi havas tiom da temploj kaj sanktejoj, ke la vizitantoj post iom da tempo en Kioto sentas iuspecan ‘templan laciĝon’, kiam oni ne plu povas distingi la templojn. Kaj vere, ene de kelkaj tagoj mi vidis tiom da Mondaj

Heredaĵoj de UNESKO, kiom mi vidis en mia tuta vivo ĝis tiam ! Ni vidis la sanktejon kun miloj da torijoj, la brilantan oran templon, kiu respeguliĝas en trankvila lago, ni vidis la templon de 1001 Budhoj, kaj ni vidis gigantajn or-fiŝegojn ‘gardantajn’ la kastelon Niĝo. Ni spektis sep tradiciajn artojn en la teatro en la historia distrikto Gion, kie (se oni bonŝancas) oni ĝis nun povas vidi veran geĵŝon, preskaŭ endanĝerigitan specion.

Mia naskiĝ-urbo Kievo kaj Kioto estas ĝemel-urboj, kaj por marki tiun ĝemeliĝon, Kievo havas Kioto-straton (kie mi, cetere naskiĝis !) kaj parkon dediĉitan al Kioto, kun aleo de kelkcent sakura-arboj. En Kioto, aliflanke, troviĝas restoracio Kiev, kiu en 2011 festis sian 40-jariĝon. Ĝi situas en la festema kvartalo Gion, sur la sesa etaĝo de sufiĉe modesta konstruaĵo. Elirinte el la lifto, oni tuj vidas la rusan kaj ukrainan flagojn, rusajn pupojn kaj ukrainajn brodaĵojn. La direktoro de la restoracio mem salutis nin kaj montris la pentraĵojn de Kievo — fakte, en 2011 li vizitis Kievon okaze de la 40-jara jubileo de ĝemeliĝo ! La restoracio mem estis fondita de lia patro, granda ŝatanto de la rusa kaj ukraina kuirarto. Oni nomis ĝin « Kievo » pro la peto de la urba registaro tuj post la ĝemeliĝo de la urboj, en 1971. Mi ekparolis angle kun kelnero — juna japana viro en ukraina brodita ĉemizo, kaj lia reago surprize ĝojigis min : ‘Mi ne parolas la anglan, bonvolu paroli kun mi ruse.’ Kiel evidentiĝis, li studis en Moskvo kelkajn jarojn (li rimarkigis, ke li studis trans la strato de Kremlo, kaj fiere nomis sin ruso). Post kelkaj frazoj en la rusa, li « saltas »... en la ukrainan lingvon ! Mia kapo tute rifuzas akcepti tion kaj mi volas pinĉi min por certigi, ke mi ne dormas aŭ ne halucinas : mi neniam imagis aŭdi japanon, en Kioto, paroli kun mi en (bona, eĉ !) ukraina lingvo ! La kelnero mem estas tre feliĉa, ĉar fakte li neniam antaŭe parolis en la ukraina kun homo el Ukrainio krom kun sia instruisto, al kies lecionoj li devis veturi kelkajn horojn al alia urbo (ĉar, evidente, ukrainaj instruistoj ne abundas en Japanio). Manĝinte la ‘ekzotikaĵojn’ el mia mondoparto kaj trinkinte la rusan bieron, ni ĝisrevidas la posedantojn. Minoru diras al niaj novaj amikoj « Ĝis la revido » en la ukraina (kion mi instruis al li antaŭ kelkaj minutoj). Li iomete misprononcas unu vorton... kaj nia ‘rusa’ kelnero tuj saltas korekti ĝin. Vere, mia kapo eksplodas !



Tahira Masako (maldekstre) kaj Minaru kun «ukraina» kelnero.

Uĵi: la tea urbo

La urbeto Uĵi situas inter la du malnovaj ĉefurboj: Nara kaj Kioto. En la malnova tempo ĝi servis kiel kampara ripozejo por nobeluloj, kaj literaturemuloj konas ĝin kiel scenejon por la japana klasikaĵo de la 11a jarcento kaj la unua klasika « psikologia » romano — La Romano pri Genĵi. Plena je historio kaj temploj, Uĵi estas ankaŭ fama pro la produktado

de la plej bonkvalita verda teo en la tuta Japanio. Fakte, Uĵi estas lulilo de te-kultivado en Japanio, kaj nia gvidantino, s-ino Ajkaŭa atentigas, ke eĉ kutimaj apudstrataj ornamaj arbustoj estas te-arboj ! Ni trapasas la tean straton, kie oni vendas teon kaj mangĉaĵojn faritajn el teo : verdteajn dolĉaĵojn, verdteajn nudelojn, verdteajn kosmetikaĵojn, kaj ni certe ne povas rezisti la tenton de la bongustega verdea glaciaĵo ! Kelkaj el la butikoj estas ege antikvaj — fakte, en Uĵi troviĝas la plej malnova te-vendejo en Japanio, kaj eble en la mondo, servanta la teon jam 850 jarojn !




La templo Bjodoin.

La plej fama vidindaĵo de Uĵi estas la feniksa halo de la templo Bjodoin, konstruita en 1053. Ĝi estas tiom fama, ke ĝia bildo troviĝas sur la dek-ena monero ! Spegulanta sin en la lago kun lotusoj, ĝi estas vere majesta, kaj oni povas nur imagi, kiel ĝi aspektis, kiam ĝi estis farbita, en sia frua tempo. La templo reprezentas la paradizon, kiel oni imagis ĝin en la 10-11a jarcento. En la antikva tempo nur nobeluloj povis eniri la halon por kontempli la tiean budhon: la ordinaruloj devis kontentiĝi rigardi ĝin de trans la lago (ni faris kiel ordinaruloj, sed pro la alia kialo : la vico por eniri estis tro longa).

Irante laŭ la Uĵi-rivero, ni vidas kaĝojn kun birdoj kormoranoj — ekde ĉ. la deka jarcento oni uzas tiujn birdojn por fiŝkapti, sed nun ili servas ĉefe por ‘kapti’ la turistojn, kiuj tre ŝatas sperti la kormoranan fiŝkaptadon. Jen kiel tio funkcias: oni metas ringon sur la kolon de la kormorano, al kiu estas ligita ŝnuro ; la birdo plonĝas por kapti la fiŝon, kaj reportas ĝin al la fiŝkaptisto. La birdo povas gluti malgrandajn fiŝojn, sed la pli grandajn ĝi devas redoni al sia ‘mastro’. Oni ne povas ne admiri la elpensemon de la genia pigrulo, kiu inventis tiun metodon !

Osaka: la urbo de akvo

Osako estas la tria plej granda urbo en Japanio post Tokio kaj Jokohamo, kaj la ‘eta’ Osako-gubernio havas tiom da loĝantoj, kiel la tuta Kebekio: ĉirkaŭ ok milionoj. Elirante, Nitta Takamiĉi, nia gvidanto, montras al ni la ĵus instalitan akvan (!) horloĝon. La falanta akvo montras ciferojn kaj la vortojn : « Osako-stacidomo ». Mi vidis sunhorloĝojn plurfoje, sed fontano, kiu montras tempon per falanta akvo — tion, verŝajne, oni povis elpensi nur en Japanio ! La akva horloĝo, fakte, honoras unu el la neoficialaj nomoj de Osako : la urbo de akvo. Oni nomas ĝin tiel pro ĝia haveno, rivero kaj kanaloj, diras al ni nia ĉiĉerono, kiu aldonas, ke, ironie, la trinkakvo en la urbo mem venas de alia regiono, ĉar la akvo en Osako ne estas sufiĉe pura...




Kun niaj bonegaj ĉiĉeronoj en Osaka.

La plej fama vidindaĵo de Osaka estas la fama belega kvinetaĝa kastelo, originale konstruita en la 16a jarcento. Sed foje okazas, ke la plej belaj konstruaĵoj estas ligitaj al multaj kruelaĵoj kaj murdoj. En la kastelo mem oni montras desegnaĵojn, kiuj povus konkurenci kun nun-tempaj horrorfilmoj kaj kiuj rakontas pri la sangoverŝaj bataloj kaj sieĝoj de la tempo de ŝogunoj.

Ni rimarkas, ke Osaka havas tute alian etoson ol la pli solena Kioto: eble, ĉar homoj portas pli gajajn kolorojn, aŭ eble ĉar estas stratmuzikistoj, kiujn ni ne vidis en iuj ajn aliaj urboj (Nitta rimarkas, ke oni

malpermesas ilin ankaŭ en Osaka, sed kiam la polico venas, ili rapide forkuras). En Osaka oni promenas pli rapide ol en Kioto, kaj ni rapide kaptiĝas en la kaoso de la osaka homfluego. ‘La tempo estas mono’, oni dirus al vi en ĉiuj komercaj urboj, kiel Osaka. Kaj en tiu urbo oni ja faras monon: ne nur figure dirite, sed ankaŭ tute laŭlitere: la japana monfarejo troviĝas ĝuste en Osaka. Tre amuzas nin, kiam, elirante el la restoracio, ni petas preterpasanton foti nian grupon, kelkaj homoj kun ĝojo salutas nin angle, farante V-signon kaj dirante ‘Cheese’! Jes, la osakanoj ja estas amikemaj kaj ŝatas amuziĝi! ‘La homoj en Osaka estas tre sinceraj’, klarigas nia kunĉiĉeronino, s-ino Hirai. Laŭ ŝi, kiotanoj foje diras, ke osakanoj estas tro abruptaj, sed estas simple, ĉar ili estas sinceraj kaj honeste diras siajn opiniojn, ne tro pensante pri la formalaj kaj ceremonioj. Aliflanke, oni ankaŭ povas kompreni la pli formalajn kaj singardajn kiotanojn: ĉar loĝante en la imperia ĉefurbo, kie la politikaj ventoj ofte ŝanĝiĝas, estas saĝe esti diskretaj pri siaj sintenoj, ĉu privataj aŭ politikaj.

Tokio kaj Jokohamo



Spiroprena vido de Tokio de Esperanto-klubejo.

La lasta parto de nia vojaĝo estas la Kantoo-regiono, kie troviĝas la plej grandaj urboj, Tokio kaj Jokohamo, kaj survoje oni preterpasas la monton Fuĵi. Niaj kiotaj gastigantoj — gesinjoroj Tahira — eĉ helpas al ni ŝanĝi la bileton por sidi ĉe la ĝusta flanko por vidi ĝin! Ni estas tre impresitaj, ke la konduktoj kaj aliaj laborantoj de Ŝinkanseno portas uniformojn, kiel en aviadiloj, kaj ili riverencas ĉiam, enirante kaj elirante la vagonon. Fakte, ne nur la ‘veraj’ laboristoj de la japana fervojo estas tiom respektemaj al la

klientoj: eĉ la desegnitaj hometoj en la vend-aŭtomato ‘riverencas’, kiam vi elprenas la biletojn el la vendmaŝino, kaj se la vojo estas fermita pro konstruado aŭ riparado, ĝi ofte montras bildon de riverencanta desegnohometo, pardonpetanta pro la ĝeno!

Niaj gastigantoj en la Kantoo-regiono estas fama Esperanto-paro — gesinjoroj Doi : Ĉieko kaj Hirokaz, ambaŭ tre aktivaj en Japana Esperanto-Instituto. De ilia bela domo en Jokohamo ni ĉiutage trajnas al Tokio, kiu situas ĉirkaŭ unu horon for de Jokohamo. Eĉ se mankas tempo vidi ĉiujn vidindaĵojn, kiuj abundas en Tokio kaj Jokohamo, ni spertas ion multe pli gravan por ni: babiladon kun la lokanoj, ĉar ni ĉiutage renkontiĝas kun malsamaj Esperanto-grupoj (ja Tokio havas dekon da Esperanto-klubo!). Ni estis invititaj de tri kluboj, kaj ĉie la gastamo de ĉiuj klubanoj estas vere ekstermezura !

Jokohamo situas apud la maro, kaj mi rimarkas, ke tie malpli da homoj ol en Kioto portas sun-ombrelon kaj estas pli sunbruniĝintaj ol en aliaj lokoj. Oni ĝuas la naĝadon en la varma maro, kaj la infanoj amuzas sin plene volviĝante per la amasoj da marplanto kuŝantaj sur la bordo. La unuan matenon en Jokohamo ni iras al ‘Plezur-insulo’: amuzparko, kiu staras sur la artefarita tero. Fakte, granda parto de la urbo mem staras sur aldonita tero, kaj la domoj, kiuj situas tuj apud la maro antaŭ kelkdek jaroj, estas nun tre malproksime de la maro. Ĝuste sur la ‘Plezur-insulo’ mi spertis ion ekstreme malplezuritan: la unuan en mia vivo veturon per rul-tobagano (mia edzo restis atendi min sube por feliĉe spekti miajn suferojn). La rul-tobagano iras malrapide supren, centon da metroj super la maro, kaj tiam ĝi ĵetiĝas suben. Mia mondo kelkfoje renversiĝas, mi kriegas plej laŭte ol ĉiuj kaj preĝas, ke ĝi rapide finiĝu. Du minutoj da infero, kaj — neniam plu!

Nian lastan tagon en Tokio nin akompanas la junuloj de Rondo Korno. Originale ĝi estis klubo por blinduloj, sed ĝi transformiĝis por inkluzivi ĉiujn. La junuloj venigas nin al la belega parko Ŝinguku-Gjoen, kie ni trinkas ceremonian teon en la malnova te-domo, konstruita en 1906, kaj al ŝinto-sanktejo, dediĉita al la spirito de la imperiestro Meĵi. Tradicie, en ŝinto-sanktejoj troviĝas aro da ofer-bareloj da sakeo — en tiu ĉi templo, aldone al la tradicia sakeo estis ankaŭ vicoj da vinboteloj — por simboli la periodon de ŝanĝiĝo kaj ‘eŭropiĝo’ de Japanio dum la Meĵi-tempo (1852–1912). En tiu ĉi sanktejo ni vidas plej multajn lignajn preĝ-amuletojn (aĉetablajn de ties vendejo) kun deziroj, skribitaj en ĉiuj



Monumento al la aŭtorino de la romano pri Genĵi.

eblaj lingvoj en la mondo. Ĝi funkcias tre facile : vi aĉetas la lignan tabulon, skribas sur ĝi vian deziron kaj lasas ĝin sur la speciala stando. Kiam la loko pleniĝas, oni bruligas la ‘dezirojn’. Oni ankaŭ povas aĉeti amuletojn kun aŭguroj: se la aŭguro estas bona, vi portas ĝin hejmen; se ne, vi lasas ĝin en la speciala loko por ‘malbonaj’ aŭguroj, tiel ke la aŭguro ne realiĝu. Ĉu japanoj estas superstiĉaj ? Eble iomete! Aŭ eble tio estas simple por amuziĝi.

La junuloj laste gvidas nin al la kvartalo Haraĝuku — fama pro sia neortodoksa modo kaj hararanĝoj. Ĝi estas la loko, kie naskiĝis la fals-viktorinaj vestaĵoj. Ni vidas kelkajn ‘lolitojn’ kun pufaj

pupecaj roboj, blondaj perukoj kaj eĉ kelkajn ‘punkajn’ lolitojn: kun same pupecaj roboj kaj altegaj ŝuoj. Kaptitaj en la multkolora homamaso, ni trairas la svarmon de tiu junuleca kvartalo por atingi la trankvilecon de artistaj kafejoj kaj galerioj tuj apud ĝi. Tie ni ĝuas bongustegan malvarman kafon sur malferma teraso kaj modernajn artaĵojn.

Nian Esperanto-plenan tokiumadon finas la vizito al JEI — la fama Japana Esperanto-Instituto fondita en 1919, en la akompanado de ĝia laborema direktoro, s-ro Iŝino. Tiu bela kvin-etaĝa konstruaĵo kun belaj malhelverdaj brikoj apartenas al JEI, kaj ĝi situas en la komerca kvartalo Ŝinĝuku, kie loĝas 17 140 personoj sur unu kvadrata kilometro, kaj kie troviĝas la plej okupata trajnstacio en la mondo. Ni vidas la ‘trezorejon’ de JEI - ĝian bibliotekon kun dekmilo da libroj, multaj el kiuj tre raraj kaj ne troveblaj aliloke (ni vidis la eldonon de Amerika Esperantisto de 1912!).

En la japana lingvo, kiam oni demandas, kiel vi fartas, oni ofte respondas, ‘Mi fartas bone, dank’ al vi’. Ĝuste tiu esprimo tre impresis min... Preskaŭ unu jaron post nia vizito al Japanio mi ne povas ne pensi pri niaj amikoj, gastigantoj, ĉiĉeronoj kaj klubanoj, kiuj igis nian viziton al Japanio tiom agrabla kaj neforgesebla. Dum la vizitoj al kelkaj kluboj oni kantis por ni belan japanan kanton, kiu nomiĝas « Ruĝlibelo ». Mi trovis ĝin en la reto kaj mi ŝatas foje reaŭskulti ĝin kaj mense reveni al Japanio kaj rememori la karajn vizaĝojn de ĉiuj niaj amikoj... Vere, nia restado en Japanio estis perfekta... dank’ al japanaj esperantistoj!

En Kliniĝanta Velboato Ili Seksumis

Wally du Temple

Forta ekvento klinigis velboaton mian
 Tial mi mankaptis tenon lofflankan.
 Sub la vela bumo amordeziraj gevelantoj
 Sin tenis tenere amkarese.
 Dume ŝaŭma blankakvo inundis la ŝipkorpon.
 Malvarmaj vestoj akvoplenaj sinkroĉis al korpohaŭtoj.
 La svingkilo vibresone murmuradis la ŝipdekon.
 Dume amdeziraj korpoj de miaj samŝipanoj tremblis
 Sinalkroĉantaj unu la alian je fervoro ekstazega.
 La stirilo forte rezistis kontroladon.
 Ne estis tempo ferli, katastrof’ ekproksimas.
 Sub vela bumo viro levis sian korpon sur virinon
 Ambaŭ korpoj etendiĝas arde seksdezire
 Sed nun la irisa orkoloro de longaj kurbitaj korpoj ŝanceliĝas
 Paro de bluarĝentaj kaj irisoraj libeloj
 Ŝvebantaj je flugiloj diafanaj
 Kopulaciis amtutplene.
 Ho ve! Boato renversita

Transen

1 venkontajn per korpa kapablo
 9 trinkaĵo de folioj
 10 (r) plejparto de ŝtalo
 11 (r) aparato kiu faras vidbendon
 13 loko
 15 jarkvanto de vivo
 17 (r) forĵetindaj rompitaĵoj
 18 fiksanta zonon
 21 (r) pezo de kubmetro da akvo
 22 angla, kimria, aŭ skotlanda
 23 movus al si
 24 (r) trinkujo
 26 diligente
 27 (r) granda sovaĝa besto, kiu timigis
 Orbuklulinon
 28 (r) loka komunikilo
 30 kontraŭstarante sen timo
 32 tiun senseksan estaĵon
 33 alproprigi al ies korpo, menso
 36 la samulon
 37 (r) belfarado
 38 (r) plata malmola pastaĵo
 39 ŝi, kiun ravas homo
 44 de iu homo
 45 denove
 46 tiujn, kiuj funkciigos ion per maŝino

Suben

1 inundanta al tuŝanta tero
 2 malgranda
 3 (r) direkti
 4 eliĝu (kiel akvo) el tero
 5 (r) platpreso
 6 ankaŭ ne
 7 pli ol necesa
 8 havantajn nenian logikan sekvon
 11 militpretiginta
 12 amo al sia lando
 14 (r) leĝaro
 16 sentu plezuron
 18 rilata al tiu bonodora rezino, eble de Gileado
 19 (r) vorto havanta samajn literojn kiel alia
 20 (r) stato de mortonte malsata bebo
 24 (r) kavo
 25 romana vi
 29 (r) komuniki per voĉo
 31 de tiu speco
 34 helvetia
 35 volumeno de kilogramo de akvo
 40 la Eternulo
 41 nur si
 42 al iu loko
 43 (r) havanta finan skribformon

--

Don Reble djr@nk.ca

MEKARO — 2014



Elizaveta (Eliza) Lisovskaya (Otavo), Bruno Pelletier kaj Trefflé (Trefleo) Mercier (Ŝerbruko).



Dum ekskurso al sapo-fabriko en Magogo. Oni rekonas interalie Guillaume Tubœuf, Laetitia Bert, François (Francisko) Lorrain, Michèle (Minjo) Renaud (Montrealo), Matthew (Mateo) Chisholm (Toronto), Nuith Morales kaj Larry Kenny (Kembriĝo, Masaĉuseco).



Unuavice: Ĵenja Amis, Suzano Roy, Finnegan kaj Blaise Simpson, Jogo Richard; duavice: Yves Bellefeuille, Nicolas Viau, Normando Fleury, Den Drown, Karlo González Ávila; malantaŭe: Detlef Karthaus, Jacob Schwartz, Margo Cohen.



Distra vespero : Joel Amis prezentas informon pri ESF dum Den Drown ridete aprobas, Carlos (Karlo) González Ávila frotas la okulojn por pli bone kompreni, Yevgeniya (Ĵenja) Amis primeditas kaj Trefflé (Trefleo) Mercier kvazaŭ dormetas.



Du virinoj kiuj ekamikiĝis danke al Mekaro 2014: Yevgeniya (Ĵenja) Amis (Verdun, Kebekio) kaj Tamara Koziej (Saint-Honoré-de-Chicoutimi).